



## Praktiku Esperanton!

### **PILO-PRESS**

Internacia  
Informservo

N-ro 6/77 - 9 feb 1977  
Aperas ĉiusemajne

Prof. D-ro Helmar Frank

Ĉu vi aŭskultas  
al Esperanto-el-  
sendoj? Ĉu vi  
skribis al la  
Radio-redakcio?

**Eldonanto/Herausgeber:**  
Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

### Pri disvastigo de la Internacia Lingvo kiel faklingvo Helpo de la esperantistaro nepras kaj efikos

Estas almenaŭ du antaŭkondiĉoj por oficialig-ŝanco de la Internacia Lingvo kiel neŭtrala komunikilo almenaŭ de la estonta Eŭropa Federacio (pri kies unua Parlamento ja balotos jam en majo 1978 la naŭ landoj de la ĝisnuna Eŭropa Komunumo). La 1-a antaŭ-kondiĉo estas pli sukcesa simpati-varbado, ekz. per alloga Eŭropa Kalendaro 1978 divers-lingva (sed, kompreneble, inkluzive de la Internacia Lingvo!) aŭ per diskoj en la Internacia Lingvo, sonbendoj ktp. - taŭgaj por dancejoj. La 2-a antaŭkondiĉo estas la realigo de kunordigita, samtempa progreso sur la kampoj kaj de lerneja instruado, kaj de faka (precipe scienca) uzo, kaj de politika subteno de la Internacia Lingvo.

Lastatempe ekestis en F R Germanio diversaj provoj sur la scienca kampo, elirigi la Internacian Lingvon el ĝia ĝisnuna getto. Tiuj klopodoj bezonas helpon de la tutmonda esperantistaro; nur tiel ili transformiĝos en konvinkajn pruvojn por la taŭgeco de la Internacia Lingvo anstataŭ en pruvojn por ĝia malhavebleco.

La ne-esperantista eldonejo Schroedel, Hannover, komencis 1975 aldoni al sia germanlingva revuo "Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft" (Bazaĵ esploroj pri Kibernetiko kaj Prihoma Scienco), jare 29,60 GM por 4 numeroj, kune kun komence 7 aliaj revuoj el 5 landoj komunan planlingvan resumaron "Homo kaj Informo". Nur tro hezite aliĝas intertempe aliaj homsciencaj revuoj - inter ili ĝis nun eĉ ne unu el la Internaci-lingvaj revuoj!

En la sama jaro Schroedel-eldonejo komencis eldoni ĉiujare unu volumon de nova libroserio germanlingva kun resumoj aŭ kompletaj tradukoj de ĉiuj artikoloj en Internacia Lingvo.

Ĝis nun aperis:

G. Lobin (kompilinto): Kybernetik und Bildung / Kibernetiko kaj Klerigo ĉ. 14,- GM ĉiu volumo, kiu aktualigadas la 5-voluman teksto-kolekton (Faktekstoĵ en 11 eŭropaj lingvoj).

B.S. Meder/ W.F. Schmid (kompilintoj): Kybernetische Pädagogik (Kibernetika Pedagogio), Kohlhammer-eldonejo, Stuttgart, 24,- GM ĉiu volumo.

Fine la Eŭropa Klubo aperigis 1976 la unuan volumon de la dulingva "Eŭropa Serio SENNACIIGITA SCIENCO":

H. Behrmann/S.Stimec (kompilintoj): Klerigo kaj Prikalkulado / Bildung und Berechnung, eldonejo difo-Druck, Bamberg; 7,- GM, enhavante unuan parton de la prelegaro de la Internaciaj Someraj Univer-sitataj Semajnoj de la Eŭropa Klubo en Primoŝteno 1976.

Ĝis nun malfeliĉe la uzo de la Internacia Lingvo ne plialtigis la vendadon eksterlanden nek alvokis jam sufiĉe da germanlingvaj apogantoj de la supre menciitaj publikaĵoj. Plibonigo de tiu situacio dum la jaro 1977 nepras por certigi la daŭrigon kaj disvastigon de tiuj klopodoj kaj por plifortigi la uzadon de la Internacia Lingvo kiel faklingvo.

(daŭrigo sur p. 2)

Pri disvastigo de la Internacia Lingvo.....(daŭrigo)

Ĉiuj povas helpi - eĉ sen elspezo de mono por aboni resp. aĉeti mem la menciitajn revuon resp. librojn: sufiĉus jam, se almenaŭ 100 - 200 esperantistoj en la tuta mondo petus sukcese la de ili uzatajn bibliotekojn urbajn, universitatajn, entreprenajn aŭ aliajn, ke ili abonu resp. aĉetu la menciitajn publikaĵojn. La kutima rifuzo ĉar ja bedaŭrinde nur tro malmultaj scipovas legi Esperanton" ĉifoje ne venos, ĉar la verkoj parte ja estas nacilingvaj kaj havas (nur aŭ ankaŭ) nacilingvajn titolojn. Do certe efikos celkonscia kunagado de la tutmonda esperantistaro - kaj per tia instigo de bibliotekoj, kaj per proponoj al konvenaj sciencaj revuoj partopreni la projekton HOMO KAJ INFORMO, kiu estos ekde ĉi tiu jaro la bazo de aŭtomata dokumentad-sistemo perkomputila.

Nota: La supre menciitaj libroj estas mendeblaj ankaŭ ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

\*\*\*\*\*

Alvoko pri BIBLIA REVUO

La 18-an de januaro ĉj. alvenis el Polujo al Raveno du telegramoj anoncantaj la subitan morton en aŭtokatastrofo de P. Henriko Paruzel.

Dum tiuj-ĉi tagoj kortuŝe ni ploris la gravan perdon de valora homo, ne nur por la Esperanto-movado al kiu li tute sin dediĉis je plena tempo sen ŝpari personajn laborojn, energiojn kaj penojn, sed precipe por la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj kie li estris ekde kvar jaroj kiel senlaca kunlaboranto en ĉiuj entreprenoj.

Kiam post la eksigo de prof. Broadribb la torĉo de la ideoj kaj esprojoj de I.A.B.O. pasis al li, ni havis okazon aprezi lian agadon ĉu por Biblia Revuo, ĉu por Biblia Vortaro, ĉu por la nova ekumena traduko de la Biblio en Esperanton: ĉar dum la lastaj jaroj sub lia redaktado Biblia Revuo ĝuis tre feliĉan periodon (por ĝi en 1974 li eĉ vizitis la Sanktan Landon); en februaro 1975 li verkis en paĝ. 124+VI Biblian Terminaron, poste sendita kiel provekzemplero al ĉiuj bibli-tradukantoj de I.A.B.O. kaj en la kolekto 1975 de Biblia Revuo en apartaj kajeroj li komencis kun E.T. Wojtakowski la redaktadon de nova granda Esperanta Biblia Vortaro, alveninta ĝis la litero G; fine li daŭrigis la jam komencitan prepar-laboron por la nova traduko de la Biblio en Esperanton.

Kaj nun lia subita morto renversas ĉiujn planojn de la I.A.B.O.-entreprenoj, ne estante ni pretaj per ni mem solaj subteni tiom da laboro. Estas pro tio ke ni adresas tiun-ĉi alvokon al ĉiuj bonvolaj esperantistoj kaj fakuloj kiuj povas nin helpi kiel-ajn por ke niaj esperantaj kaj bibliaj entreprenoj daŭru ĝis la fina efektivigo de la planita celo.

Atendante, ni dankas pro via ŝatata helpo, petante ke ĝis la anstataŭo de la redaktoro oni bv. adresi leterojn, proponojn, materialojn kaj ĉion al nia Ravena adreso.

Raveno, la 31-an de januaro 1977                      Prof. A. Duranti  
Prezidanto de I.A.B.O.

Adreso: Biblia Revuo, Piazza Duomo 4, I-48100 Ravenna, Italujo

\*\*\*\*\*

Pilo-Press, ĉiusemajna informservo en Esperanto, jara abono 30,- GM  
Bv. paĝi al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,  
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

### IEMW 50-jara

Vieno (pp) - Kort. kons. Steiner ĉiam menciis la jaron 1927 fond-jaro de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (IEMW), kaj multaj esperantistoj kaj membroj de la muzea unuiĝo certe atendas por ĉi-tiu jaro memorfestaraĝon. Sed fakte la oficiala malfermo de tiu ŝtata Internacia Esperanto-Muzeo, aligata al "Österreichische Nationalbibliothek", okazis la 1-an de aŭgusto 1929 dum granda solenaĵo fare de la tiama prezidento de Aŭstrio, Wilhelm Miklas. Tial la Muzeo intencas solene festi la inaŭguran daton en 1979 per granda ekspozicio kaj festaraĝo.

Tamen por memorigi la fakton, ke antaŭ 50 jaroj Hugo Steiner fondis la muzean unuiĝon, IEMW instalis malgrandan specialan ekspozicion. Videblaj ankaŭ estas 8 kopioj el la muzea honorlibro (vizitlibro), nome la aŭtografoj de eminentaj personoj ŝtataj kaj ekleziaj kaj de famkonataj esperantistoj.

IEMW estas senpage vizitebla lunde, merkrede kaj vendrede de la 9 - 15,30 horo. Adreso: A-1010 Wien, Hofburg, aliro sub la granda kupolo, 3-a etaĝo.

### Prelegvojaĝo de s-ino Haudebine

Bad Hersfeld (pp) - Laŭ invito de Germana Esperanto-Asocio s-ino Haudebine, Parizo, kiu dum multaj jaroj estadis en Hindujo kaj tie instruis Esperanton, faros prelegvojaĝon ĉe Esperantogrupoj en F R Germanio de la 18-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1977. Ŝi prelegos pri la temo "Evoluhelpo en Hindujo". Ŝi prelegos verŝajne en Oberkirch, Nürnberg, Würzburg, Hamburg, Bremen, Münster, Dortmund, Wuppertal, Frankfurt, Mannheim-Ludwigshafen, Stuttgart.

### Helpo por la lepruloj

Neuwied (pp) - Laŭ informo de d-ro Joseph Kondor per la vendado de la glumarkoj "Helpu al la lepruloj" jam estas enspezitaj pli ol 4 000 GM. La vendado ankoraŭ daŭras. Mendu ĉe D-ro J. Kondor, Alte Schloßstr. 25, 5450 Neuwied 21

### Novspeca Esperanto-ekzameno

Paderborn (pp) - Fine de januaro 1977 okazis en Paderborn, F R Germanio, unuafoje tute novspeca Esperanto-ekzameno de la Eŭropa Klubo. Oni ekzamenis ne la parolkapablon, sed nur la komprenon de la Internacia Lingvo. La t.n. "Lingvokomprenekzameno" konsistas el 5 partoj: 1) diktaĵo, 2) 16 demandoj el la gramatiko de Esperanto, 3) traduko de Esperanto en nacian lingvon, 4) traduko el la strukturaj vortoj kaj el la 50 plej oftaj vortoj, 5) traduko el la 1000 plej oftaj E-vortoj. La tuta ekzameno estas skriba.

La ekzamen-komisiono konsistis el Prof. D-ro Helmar Frank, dipl.ing. Ullrich Molter kaj Karl Trimborn. 9 personoj sukcese trapasis la ekzamenon, i.a. ankaŭ s-ino Moulud Saghafian el Teherano/Irano. Prof. Frank diris okaze de la atesto-transdono, ke estas iom strange, ke ne-eŭropano partoprenas ekzamenon de Eŭropa Klubo kaj eĉ sukcesas per la juĝnoto "tre bone". S-ino Saghafian estis dum 3 monatoj en Paderborn kaj konsiderinde progresis en la lingvo. Ekde la fino de januaro ŝi restadas en Parizo ĉe s-ino Haudebine.

\*\*\*\*\*

Atentu! La speciala numero de Pilo-Press okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 1977 aperos la 14-an de februaro 1977. Se vi intencas saluti viajn geamikojn per salutanonceto, sendu tuj la tekston al Pilo-Press laŭ la kondiĉoj de PP n-ro 1/76!

### Prelegserio en Triesto

Triesto (pp) - Enkadre de sia ĉi-jara propagand-agado, Triesta Esperanto-Asocio planis serion da prelegoj kun samtempa projekciado de diapozitivaj pri diversaj mondnaĵoj. La unua prelego, okazinta la 21-an de januaro, temis pri " Kanado kaj ĝiaj naturbelecoj". Parolis la vicprezidanto de T.E.A., s-ino Edvige Ackermann. Rimarkinda estis la ĉeesto de ne-esperantistoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto. La plano antaŭvidas po unu prelego ĉiunonate; en februaro okazos prelego pri Argentino kaj en marto pri Hungario.

### Bibliografiaj informoj

#### Till Eulenspiegel en Esperanto

La eldonejo Bleicher, Gerlingen, kiu pasintjare eldonis la germanlingvan poŝlibron "Mein geliebtes Esperanto" (Mia amata Esperanto) plume de Richard Schulz, anoncas la baldaŭan aperon de la Esperanto-traduko de Till Eulenspiegel (Strigospegulo) laŭ la eldono de 1515 kun 87 lignogravuraĵoj de la sama aŭtoro, Richard Schulz. Tiu libro estos raraĵo por libro-amantoj. Antaŭmendojn akceptas Libroservo Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

#### Pri internacia lingvo dum jarcentoj

En marto aperos la dua, pliampleksigita eldono de la libro "Pri internacia lingvo dum jarcentoj" de mag. Isaj Dratwer, 330 paĝoj, kun indekso de pli ol 700 nomoj, pozicioj kaj eldiroj. Prezo 30,- GM. Antaŭmendojn akceptas Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1.

\*\*\*\*\*

#### Esperanto en Radio

Vieno. La Esperanto-redakcio de ORF Wien ricevis en januaro laŭ la konstatoj de Pilo-Press 106 korespondaĵojn el 15 landoj. Jen la koncerna statistiko laŭ landoj: F R Germanujo 29; Aŭstrio 19; Sovetunio 11; Hungario 10; Italio 7; Francio 6; Pollando 6; Anglujo 4; Ĉeĥoslovakio 4; Finnlando 3; Nederlando, Svedio po 2; Belgio, Grekujo, Norvegio po 1. Krome venis korespondaĵo el Brazilo kaj el Etiopio.

Romo. El unu el la leterkestoj de tiu E-radiostacio ni citas: "El Rimini pastro Duilio Magnani amplekse raportis pri la baptoceremonio en Esperanto, kiu okazis la 24-an de oktobro en la Preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo. La graveco de la ceremonio ne konsistis en la uzata lingvo, ĉar baptado en Esperanto jam plurfoje okazis, sed en la fakto, ke unuafoje tia E-lingva ceremonio havis lokon dum la lastima, ĉiutaga meso, tiel engaĝante la tutan loĝantaron de la paroĥejo.....Ni sendas multajn bondezirojn al la juna baptito, Guerrino Antonio Perna, kaj al liaj gepatroj Alfonso kaj Albarosa. Samtempe ni gratulas la senlacan paroĥestron Duilio Magnani, kiu nun planas alian originalan iniciaton: starigi rektajn kunligojn, pere de Esperanto, inter loĝantoj de Rimini kaj indiĝenoj de la latin-amerika lando, kie baldaŭ komencos agadi Misiisto sendota de la Diocezo de Rimini."

IBRA Radio. La kristana elsendo de IBRA RADIO denove estis bone aŭdebla en Nürnberg, parolis ĉi-foje la konata sveda esperantisto Carlén pri preĝado. Li alvokis la esperantistojn unuiĝi en preĝada rondo. Preĝi esperantistoj povas por norda Irlando, por ĉesigo de la konflikto inter Israelo kaj la arabaj ŝtatoj kaj por la venko de Esperanto; Esperanto estas laŭ la dia volo; Dio volas ke la homoj interkompreniĝu!

Radio Vatikana same bone estis aŭskultebla ĉi-foje. Radio Varsovio dum la pasinta E-Ekspreso tuŝis gravan problemon pri argumentado, pri kiu ni traktos en venonta numero. La spaco bedaŭrinde estas elĉerpita....